Fournier, Alain. *La granda Meaulnes*, 1976

Richardson, David. *Esperanto: learning and using the International Language*, 2004

Baker, Arthur. *The American Esperanto book*, 1909

Zamenhof, L. L. *Fundamento de Esperanto*, 1907

Dobrzyński, Roman, *La calle Zamenhof*, 2017

Zamenhof, Lidia. *Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj*, 2008

Donacinto: Duncan Charters

Schor, Esther. *Bridge of words*, 2016

Donacinto: Elsa Martínez

La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj, 2023

Donacinto: Pedro Zurita

Ragnarsson, Baldur. *La lingvo serena*, 2007

Lins, Ulrich. *La danĝera lingvo*. 2016

Waringhien, Gaston. *1887 kaj la sekvo...* 1990

Interlingvo inter lingvoj, 2015

Dijk, Ziko van. *Esperanto sen mitoj*, 2003

Teozofio, 2018

Donacinto: Jorge Camacho

Camacho, Jorge. *Palestino strangolata*, 2016

Mestre, Juan Carlos. *Las estrellas donde beben los caballos*, 2023

Donacinto: Manuel Parra

Sipos, Valerija. *Ne kredu ĉion, kion vi pensas*, 2020

Dil Avia. Hispana, kataluna, Mangada ..., 2003

Hergé. *La templo de l' suno*, 2012

Scienca lerneja kalendaro 2022

Donacinto: Néstor Etayo

Bahá'u'lláh. *La kaŝitaj vortoj*, 2009

Ouida. *Hundo de Flandrio*, 2004

Manifesto de Prago de la movado por la internacia lingvo Esperanto, 2000

Donacinto: Marija Belošević

Francisko, Papo. *"Ne timu, estas mi"*, 2023

Millán Romeral, Fernando. *Titus Brandsma*, 2023

Donacinto: Viviana Isernia

Isernia, Viviana. *Allah Akbar*, 2020

Donacinto: Santiago Camblor

Löwenstein, Anna. *La memoraĵoj de Julia Agripina*, 2021

Donacinto: Matilde Montero

Seguimos leyendo..., 2022

Donacinto: Philippe Benoît

Benoît, Philippe. *Espero fola*, 2023

Donacinto: Nekonata

Aïvanhov, Omraam Mikhaël. *La homo, konkere al sia destino*, 2023

Akirita de HEF:

Arana Luzuriga, Aitor. *La okulvitroj de Lidia*, 2023

Landa, Mariasun. *Ĉapulo la fantomo*, 2013

Kazabon, Antton. *Momolo*, 2015

Berasakuze, Gari. *Ruĝaj tulipoj*, 2015

Trovu ĉi tiujn kaj aliajn dokumentojn en la retkatalogo de Biblioteko Juan Régulo Pérez: <https://bibliotekojrp.esperanto.es/>

Ana Manero

RAPORTO PRI LA INSTRUADO DE ESPERANTO EN MEZLERNEJO



Pluraj ĵurnaloj de la grupo "Prensa Ibérica", publikigis en marto artikolon pri la instruado de Esperanto en mezlernejo Almenara de Vélez-Málaga (Andaluzio), inter kiuj: "El Periódico de España", "La Nueva España", "Levante", "La Opinión de Murcia", "Diario de Mallorca", kaj aliaj

La titolo estis: «La heroaĵo de la sola instituto en Hispanio, kiu revivigis Esperanton, la lingvon kreitan de pola okulkuracisto en 1887: "La celo estas ne konkuri kun la angla"», kun intervjuo al la instruisto, motoro de la iniciato, Fabián Jiménez.

Vi povas legi ĝin ekzemple en la ligilo: <https://www.epe.es/es/cultura/20240325/proeza-unico-instituto-espana-resucitado-99831795>.

BAZARO PRI LINGVOJ KAJ KULTUROJ EN LA UNIVERSITATO DE SEVILO

En la kadro de projekto de Kunlaborado por Disvolviĝo, por plifortigi la instruadon de la hispana en la kampadejoj por okcidentsaharaj rifuĝintoj, la 15-an de marto okazis ĉe la Universitato de Seviljo la 4-a Bazaro de Lingvoj kaj Kulturoj, en grandaj tendoj matene ĉe la Fakultato de Filologio kaj posttagmeze en la Fakultato pri Edukado.

POEZIO POR PALESTINO, ANKAŬ EN ESPERANTO

Dum la pasintaj monatoj okazis pluraj agadoj favore al Palestino, en kiu partoprenis esperantajn poetojn.

La vendredon 22an de decembro, Jorge Camacho prezentis novan eldonon de sia poemaro “Palestina estrangulada” (versio plejparte hispanlingva de “Palestino strangolata”), lanĉitan de la




eldonejo Cantarabia. La agado okazis en la librejo Sin Tarima, de Madrido, kaj ĝin ĉeestis ankaŭ la intelektulo Santiago Alba Rico, verkinto de la enkonduko.

En januaro okazis pliaj aktivadoj, eĉ du en sinsekvaj semajnfinoj, en kiuj rolis niaj Esperanto-poetoj Miguel Fernández kaj Jorge Camacho.

La plej grava estis la kunvoko “Poezio por Palestino”, poezia maratono surbaze de 12 sinsekvaj horoj, de la 10a matene ĝis la 10a nokte, la 20an de januaro. Tia iniciato, fare de la grupo de soci-kritikaj poetoj praktikantaj la t.n. “poezion pri la kritika konscienco”, eĥiĝis tiel, ke en 30 urboj, pluraj hispanaj kaj kelkaj hispanamerikaj, oni organizis similajn poeziajn maratonojn. En ĝi, estis invititaj al partopreno 120 poetoj, inter ili Miguel Fernández (en la apuda foto) matene, kaj Jorge Camacho posttagmeze. Tiu poezia maratono havis lokon ĉe CSOA (*Centro Social Okupado y Autogestionado*) La Ferroviaria.

Tonjo del Barrio



Kie vi kaŝiĝas, paco?

Mi tre solas kaj tre timas

La bruegon de la maro,

Ĉar senhalte ĝi moviĝas


Pro la sinsekva bombado...

Ángel Arquillos

EŬROVIZIO EN ESPERANTO

La esperantistaj ŝatantoj de la konkurso Eŭrovizio ĉijare havas du bonajn novaĵojn. Unue, la kanto kiu reprezentos Hispanion en 2024 havas version en Esperanto. Vi povas aŭskulti ĝin en: <https://youtu.be/TaaGH0i8E64>. Certe vi scias ke la kanto, kies titolo en la hispana estas "Zorra", estis sufiĉe polemika en Hispanio, do ni ne garantias ke ĉiuj homoj ŝatos ĝin, sed certe ĝi estas koniginda kiel kuriozaĵo.

Aliflanke, Esperanto havis aktivan rolon en la festivalo, pere de la procezo de selektado de la reprezentanto en la Respubliko San-Marino, nome, unu el la kantoj partoprenintaj en tiu selektado havis tekston en Esperanto. Temas pri "Mi sangas sen vi" (tiel en la originalo), kantita de la rumandevena Sandro Machado. La Esperantlingva kanto bedaŭrinde ne trafis la finalon, sed eĉ sen tio ĝi havas historian signifon, ja okazis la unuan fojon, ke Esperanta kanto aperis en la kadro de la Eurovizia konkurso. Vi povas ĝin aŭskulti tie ĉi: <https://www.youtube.com/watch?v=Cc2AIWTPJII>.



ANONCO PRI RENOVIGO DE LA PAĜARO DE HEF

Teknologio evoluas rapide, kaj kun ĝi, ankaŭ evoluas la bezonoj kaj postuloj de ĝiaj uzantoj. Tio estas la realo, kiun nia teamo ĉe *esperanto.es* komprenis en la lastaj jaroj kaj decidis fronti. Post pli ol dek jaroj da servado kaj dediĉo al la disvastigo de Esperanto tra la Reto, ni ekkomprenis, ke ni devas renovigi kaj modernigi nian paĝaron.

La retejo *esperanto.es* estis pionira en la uzado de mastrumiloj, dizajno kaj kvalito de la informoj. Tamen, post multaj jaroj, ĝi estis iom postlasita, kaj la teknologia solvo fariĝis malnova, aperis sekurecaj problemoj, kaj eĉ la informoj ne plu estis aktualaj.

Por solvi tiujn defiojn, la estraro de HEF decidis renovigi ĝin. Oni nomumis komitaton, kiu laboris dum kelkaj monatoj, por fine prezenti al vi ĉi tiun novan version.

Ni esperas, ke ni sukcesis solvi la ĉefajn teknikajn kaj sekurecajn problemojn, kiujn ni suferis dum lastaj monatoj, kaj samtempe liveri aktualajn kaj kvalitajn informojn al nia publiko pri Esperanto kaj la agado de la Federacio.

The screenshot shows the homepage of the Esperanto Federation of Spain (HEF). At the top, there is a green header with contact information (+34 938 547 104 / +34 914 468 079, info@esperanto.es) and language options (Esperanto, Català, Galego, Euskara, AVISO LEGAL). Below the header is a navigation menu with items like Inicio, ¿Qué es?, Aprender, Una cultura viva, La Asociación, Servicios, and Español. The main content area features a newsletter sign-up form on the left, a featured article on the right with a photo of Esperanto keyboard keys, and a section at the bottom with three columns: ENSEÑANZA (Teaching), INFORMACIÓN (Information), and VOLUNTARIADO (Volunteering). Each column contains a brief description and a link to more information.

Retejo estas vizitkarto, kiu montras la nivelon de organizoj kaj ideoj, kiujn ĝi reprezentas, kaj estas respondeco de la Federacio prizorgi ĝin per ĉiaj eblaj penoj, ĉar temas pri unu el la ĉefaj projektoj de la asocio.


Kiel kunordiganto de la menciita komitato kaj teknika respondeculo mi deziras danki la valoran laboron de la homoj, kiuj estis parto de ĝi, precipe Ana Manero, Antonio Valén, Toño del Barrio kaj David Trigo.

Ni daŭrigos la aktualigon de la enhavo kaj la ampleksigon de nia teknika agado, precipe en sociaj retoj, kaj plifortigante projektojn kiel Bitoteko.

Ni esperas, ke la rezulto estos bone akceptita de ĉiuj membroj kaj simpatiantoj de HEF, kaj ni estas malfermitaj al ĉies kritikoj kaj sugestoj, kiujn ni atente pristudos, ĉar retejo estas dinamika projekto, en konstanta ŝanĝo, kies finon oni neniam atingas.

Miguel A. Sancho

LA DUA BULTENO DE LA 109-A UK EN ARUŜO HAVEBLAS RETE



La Dua Bulteno de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta en Aruŝo, Tanzanio (3-10 aŭgusto 2024) haveblas rete en la paĝo de la UK: <https://uk.esperanto.net/2024/duabulteno>. La Dua Bulteno donas utilajn informojn pri la lando kaj la kongreso (alveno, kongresejo, temo kaj unua rigardo pri la programo), sed, plej grave - prezentas mendeblajn servojn de la UK, kiel hotelojn kaj ekskursojn. En la paĝo de la UK disponeblas kaj foliumebla versio, kaj la elŝutebla PDF-versio (10 Mb).

La antaŭkongresaj ekskursoj estas planataj tri - ĉiuj kiel safariaj vojaĝoj - kaj ĉiuj celas prezenti la belecon de la tanzania naturo kun la sovaĝe vivantaj tieaj bestoj. Cetere, ĉu vi sciis, ke origine la nomo safario (*safari*) signifas "vojaĝo" en la [svahila](#)?

La unua ekskurso “**Naciaj Parkoj: Serengeti kaj Ngorongoro**” okazos inter 30.7.-2.8. (4 tagoj / 3 noktoj). Dum tiu ĉi safaria ekskurso vi vizitos du naciajn parkojn – Serengeti kaj Ngorongoro. Serengeti estas la plej konata nacia parko, fama pro abundeco de bestoj kaj pitoreskaj pejzaĝoj. Ĉi tie vi havos la ŝancon vidi la bestojn de la “La granda kvinopo” (“Big 5”) – leonojn, rinocerojn, leopardojn, elefantojn kaj bubalojn. Ni esperas, ke vi vidos ilin ĉiujn! En ambaŭ parkoj estas ankaŭ aliaj bestoj kaj riĉa flaŭro.

La dua ekskurso “**Tri naciaj parkoj kun vizito al triboj**” okazos 30.7.-2.8. (4 tagoj / 3 noktoj). Dum tiu ĉi safaria ekskurso vi vizitos tri belegajn naciajn parkojn – Lago Manyara, Ngorongoro kaj Tarangire, famajn pro siaj riĉaj flaŭro kaj faŭno. En la parkoj oni veturos per specialaj terenaj aŭtoj kaj havos la ŝancon vidi multajn bestojn – ekz. bubalojn, ĝirafojn, leonojn, elefantojn, simiojn, zebrojn. Aldone vi vizitos setlejojn de du tanzaniaj triboj – hadzoj kaj datogoj – kaj ili konatigos vin kun sia riĉa kulturo kaj tradicioj.

La tria (malpli longa) ekskurso “**Tri naciaj parkoj en tri tagoj**” okazos 31.7.-2.8. (3 tagoj / 2 noktoj). Tiu ĉi safaria ekskurso similas al AK2, sed estas unu tagon malpli longa kaj ne enhavas viziton de tanzaniaj triboj. Dum tiu ĉi ekskurso vi vizitos tri belegajn naciajn parkojn – Lago Manyara, Ngorongoro kaj Tarangire, famajn pro siaj riĉaj flaŭro kaj faŭno.

La **postkongresaj ekskursoj** proponos du malsamajn celojn - depende de la gusto de la kongresano: la unua okazos inter **la 11-a kaj 13-a de aŭgusto 2024** (3 tagoj / 2 noktoj) kaj ĝi ripetas la antaŭkongresan ekskurson AK3. Dum ĝi vi vizitos tri belegajn naciajn parkojn – **Lago Manyara, Ngorongoro kaj Tarangire.**

Por la longa postkongresa ekskurso ni invitas vin viziti fabelan **Zanzibaron** – insularon en Tanzanio, faman pro siaj belegaj ripozlokoj ĉe la maro. La programo enhavas kaj interesajn ekskursojn, kaj sufiĉe da libera tempo por povi plaĝumi kaj ripozi post la intensa kongresa semajno. Ĝi okazos inter **la 10-a kaj 15-a de aŭgusto 2024** (6 tagoj / 5 noktoj).

La antaŭ- kaj post-kongresajn ekskursojn necesas mendi ĝis la **30-a de aprilo 2024** per la reta mendilo. Per ĝi ankaŭ eblas mendi loĝadon kaj dumkongresajn ekskursojn (mendo de la bankedo ankaŭ aperos baldaŭ). Ĉiu kongresano ricevas al sia retroŝtkesto personan ligilon por la reta mendilo.

Bonvenon al Aruŝo! Tiuj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al la 109-a UK, povas tion fari per <https://uk.esperanto.net/2024/>. Kaj por resti regule informita vizitu la UEA-paĝon ĉe Facebook: <https://www.facebook.com/universala.esperanto.asocio>.

Gazetaraj Komunikoj



De multaj jaroj ekzistas diversaj lingvo-interŝanĝaj aplikaĵoj en la Interreto. La plej multaj el ili havas Esperanton kiel unu el siaj elektoj. Kvankam mi uzis Tamdem aŭ Conversation Exchange, mi fokusiĝos al Hello Talk, unu el la plej bone taksitaj aplikaĵoj por Android kaj iOS. Antaŭ preskaŭ tri jaroj kaj por plibonigi mian francan, mi aliĝis al Hello Talk, per la VIP-konto. Esence temas pri (per filtriloj kiel lingva nivelo, aĝo, sekso, loko, ktp.) trovi homojn kun kiuj oni povas fari la lingvan interŝanĝon per la uzo de babilejo (kun voĉaj mesaĝoj de ĝis 1 minuto), voĉo per la sama aplikaĵo, tekstokorektado, tradukado aŭ grupkreado. Tiusence la sperto por la franca estis grandioza ĉar, kun iom da pacienco, oni sukcesas trovi bonegajn homojn.

En la kazo de Esperanto, mi decidis krei grupon (estas miloj kaj por ĉiuj gustoj, kaj malfermitaj kaj limigitaj).

La unua kontakto kun kiu mi formis la grupon estis mezaĝa usonano, kiu ankaŭ lernis la hispanan. Nuntempe la grupo konsistas el 52 personoj, la plimulto el ili tre junaj kaj el tre diversaj devenoj, kvankam, jam de kelkaj monatoj, la ĉinoj kaj la indonezianoj venkas de longe. Estas ankaŭ aŭstralianoj, ĉilianoj, francoj, meksikanoj,...

Antaŭ kelkaj monatoj la grupo estis haltigita sed lastatempe ĝi denove reviviĝis kun interŝanĝoj en Esperanto pri la plej diversaj temoj, ĉio ene de bona etoso de respekto.

Oni devas konsideri, ke en la plej multaj el ĉi tiuj aplikaĵoj estas nedezirindaj homoj, iuj, kiuj uzas falsajn profilojn por akiri monon, por flirti aŭ por ĉikani. Oni devas scii uzi la aplikaĵon por ne perdi intereson, ĉar la fina celo estas tre interesa kaj utilas interalie por disvastigi scion pri nia lingvo.

Ignacio Valderas Radio

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

2024

De la 9-a ĝis la 16-a de marto okazis en la bela hotelo Miléade en *Les Issambres*, en suda Francio, la jam bone konata Mediteranea Esperanto-Semajno (MES). Novan torĉon transprenis la Provenca Esperanto-Federacio. Organiza teamo konsistis el la entuziasmaj esperantistoj Thierry Spanjard, Renée Triolle, Marc Gallardo kaj Rosy Inaugi. La staĝon partoprenis okdek geesperantistoj el dek landoj. Post la alveno, sabate posttagmeze, nin akceptis la organizantoj kiuj disdonis al ni la necesajn materialojn. Renée tre bone majstris la aranĝon disdonante aktualajn informojn al la ĉeestantoj.

Ĉe la antaŭvespera kunveneto nin bonvenigis la hotelestro s-ro Jean-Luc Helias. Li prezentis al ni la skipon, zorgontan pri nia bonfarto. Poste li parolis pri la historio de la hotelo kaj invitis nin al solena aperitivo. Post bongusta vespermanĝo Renée Triolle prezentis la novajn organizantojn. La kursgvidantoj sin mem prezentis. Dimanĉe posttagmeze okazis membro-kunveno de Esperanto-Provence.

Okazis tri diversnivelaj Esperanto-kursoj. La komencantojn prizorgis Rodica Todor el Rumanio. Ŝi vigle mastris la kurson per varia instruprogramo kaj paroligis la lernantojn. Pri progresantoj okupiĝis Szilva Szabolcs (Sabi) hungaro loĝanta en Pollando. Li instruis laŭ sia metodo uzante komputilon. En la kurso por fluparolantoj Mireille Grosjean donis multajn utilajn informojn pri Afriko akompanatajn de bildoj, kio povis instigi iujn al partopreno en la ĉi-jara UK en Tanzanio. La menciitaj kursoj okazis antaŭ la tagmezo kaj antaŭ la vespermanĝo. Posttagmezoj estis liberaj, do la ĉeestantoj povis profiti promenojn en la ĉirkaŭaĵo, ludi kartojn aŭ elpensi aliajn ludojn kaj aktivajojn. Ankaŭ la hotelo proponis diversajn programerojn, en kiuj oni povis partopreni. Antaŭ la posttagmeza E-kurso, al la programo estis aldonitaj diversaj prelegetoj. Ni povis ekscii pri la unua inventisto de la fotografio, Nicéphore Niépce naskiĝinta en *Chalon sur Saône* en la jaro 1765-a. El informo pri Ruando indiĝenoj perdas sian vivmanieron nome de natura konservado. Ekestis demando: "Kiujn protekti ĉu homojn ĉu bestojn?" De Nina Korjnievskaya ni ricevis informojn pri la rusa urbo Ufa. La lasta prezento temis pri neceso arĥivi esperantaĵojn.



Dum la matenaj paŭzoj Monique Prezioso kaj Simone Marlier prizorgis servadon de kafo kaj de teo. Funkciis ankaŭ libroservo kaj eblis trarigardi la fotoalbumojn de diversaj E-eventoj. En la loka gazeto "Var-matin" aperis sur tuta paĝo komuna foto kun la artikolo pri Esperanto menciata nian staĝon.

Merkrede posttagmeze estis planita vizito al la mondkonata parfumejo "Fragonard" en la urbo *Grasse*. Dum la gvidata vizito ni ricevis informojn pri la procedo produkti parfumojn kaj ni povis flari diversspecajn floresencojn. En la vendejo eblis aĉeti diversajn parfumojn, parfumitajn sapojn, kandelojn kaj aliajn kosmetikaĵojn.

Ankaŭ vesperaj programeroj estis interesaj. Dimanĉe, Mirejo prezentis la historion de Afriko kaj la filmon Bamako. Lunde, ni povis sekvi la legendon kaj la historion de Drakulo prezentitan de Rodica. Marde, Sebi parolis pri "familiaj" arboj kaj instruis nin pri geneologio. Merkrede, post la ekskurso, Mirejo prezentis kelkajn mallongajn filmetojn pri Afriko kaj vespere Euhenio Kovtonjuk parolis pri la reala situacio en Ukrainio. Li prezentis diversajn aspektojn, spertojn kaj proprajn pensojn. Ĵaŭde ni ruĝe vestitaj partoprenis komunan dancvesperon. La lasta vespero estis dediĉita al programeroj de la partoprenantoj. Ni ĝuis kelkajn teatraĵetojn, skeĉojn, deklamadojn de poemoj, kantojn, ŝercojn. Poste oni gratulis kaj pridonacis la organizintojn kaj la kursgvidintojn. Ĉiuj meritas korajn dankojn pro la bone preparita semajno kun bunta programo kaj profunda studado. Post la muziko de Josiane, Yannick kaj Marithé, sekvis dancado.

Ĉe la alveno pluvis, sed rapide la vetero ŝanĝiĝis al plensunaj tagoj, kio ĝojigis nin ĉiujn. En antaŭaj semajnoj oni logis esperantistojn per frazoj: "Lazurbordo estas loko kie floras mimozoj". Ĉi-foje ili jam estis forvelkintaj. Venontjare oni verŝajne devos diri: "Bonvenigos vin rozkoloraj florantaj migdalarboj". La Mediteranea Esperanto-Semajno okazos ekde la 15-a ĝis la 22-a de marto 2025.

Liba Gabalda



LA STRANGA ANGULO

Ĉapitro 12a

Ludo de testosterono

Kelkfoje mi estas antaŭ alia iĉo, mi rigardas liajn okulojn kaj per serioza mieno diras "kolego, ni havas problemon". Mi scias, ke ĉiuj havas problemojn. Sed ni, la viriĉoj, suferas pri iu konkreta, per kiu ni neintence ankaŭ suferigas aliajn homojn, aliajn vivaĵojn eĉ aliajn aĵojn, kaze ke aĵoj suferus.

Ĉi tiu konfeso venas de la pordo malfermita per la antaŭa ĉapitro, kiam mi kuraĝis kunhavigi kun vi mian version pri la vera religia kristana origino de la homaro: Dio kreis unue la virinon, poste eksperimentis pri versio iom handikapulita, la viriĉo, sed tiu prenis la ĉefecon de la homaro, same kiel okazas kutime en la historio: la plej forta kaj senkapa homo detruas la alian.

Per tiu malfermita pordo mi komencis pensi pri bonega ideo de la biologia evoluo, kiu iĝis malbonega en la evoluo socia.

Mi tuj klarigos.

Imagu grandan familion aŭ aron da kelkaj familietoj, kiu iĝis stabila grupo antaŭ pli ol 10 mil jaroj. Mi nomos ilin la familio EMEBA. Estas printempo. Ili loĝas en montotruo. La naturo belas. Rivero proksimas. Nuboj ŝajnas mildaj artaĵoj el kotono. La birdoj kantas bele. La infanoj kuras trankvile. Homoj serĉas piedikojn kaj aliajn bongustajn manĝindaĵojn en la hararo de la aliaj. Temas pri la paradizo.

Venas neinvitita besto. Ĝi pezas 200 kilogramojn. Ĝi havas dentojn pli ol 10 centrimetrojn longaj. Ĝi estas trioble forta ol averaĝa homo. Ĝi moviĝas kvaroble rapida ol averaĝa homo. Ĝi kapablas manĝi kvinoble ol averaĝa homo, se ĝi havus la ŝancon trovi manĝaĵojn. Jes, ĝi malsategas. Kaj hodiaŭ estas ĝia atendata tago. Piedirante komforte ĝi renkontis la montotruon, kie loĝas la familio EMEBA. Ĝi ne havas urĝon. Kial? Ĉar ĝi scias, ke neniuj homoj estas pli fortaj, pli rapidaj nek pli malsatitaj ol ĝi. Do la besto pacience flaras la sukceson.

Normala homo sentus timon. Oni povas imagi la emebanojn kurantaj, serĉante ian truon ene de la montotruo, kiu faciligu sinkaŝigon. Oni povas imagi ilin kriante avertantaj aliajn pri la alveno de la granda minaco. Oni povas imagi multe. Kaj certe ĉio okazis en la estinteco, kiam besto timiga renkontis homojn nepretaj.

Sed ne estas tio, kio okazas.

La besto mortis. La travivantoj haltas. La sango rearanĝiĝas en la korpo. La luktintoj ekkonscias pri sia ĵusa agado.

Antaŭ miloj da jaroj, kiam ne ekzistis io simila al tio, kiun ni nomas homa socio, niaj prauloj bezonis stultiĝi kelkfoje. Ne temas pri ofta sperto, sed sufiĉe grava okazaĵo. Nur stultulo povas taksii, ke li perforte venkos pli elstaran forton.

Kiel povas tio okazi? La invento nomiĝas testosterono. Estas mirakla hormono. Danke al ĝi, saĝa homo perdas la kapon kaj reagis tiel, kvazaŭ la homa cerbo flugis el lia kapo ĝis nekonata loko. Dek homoj sufiĉe prenitaj de la testosterono kuras lukti kontraŭ ar- meo da 1000 soldatoj. Testosterono atingas demeti ian spuron de pensado. Nur tiel, stultiĝante, homoj travivis antaŭe. Nur tiel oni kapablas premi la ŝaltigilon de pafilo kaj mortigi multajn fratojn kriante ian nekoheraĵon. Mi ne scias, ĉu vi havis la ŝancon spekti faman ĉapitraron, nomita Ludo de Tronoj. Mi pensas, ke ĝi devintus nomiĝi Lu- do de Testosterono. Danke al tio, vakua diskurso iĉege kriita atingas, ke la iĉaro soldate vestita krii kiel prauloj duonhomaj. Tia homo estis bezonata dum la pratempo.

Sed nuntempe la socio estas alia.

Malgraŭ la malapero de fizikaj minacoj, kiel tiu de la 200-kilogramo besto, la testoste- rono ne turismas ekster la korpo de viriĉoj. Ĝi ankoraŭ restas. Sed same kiel antaŭe tiu hormono igis homon viriĉo, nun ĝi igas lin viraĉo.

Dum iom da jaroj mi loĝis en iu kvartalo, kie estis trinkejo neniam fermita. Do fruma- tene, kiam ĉiuj aliaj ebriulproduktejoj jam estas ripozantaj, atendante la matenan homan riveron de matenmanĝantoj, tiam la lastaj testosteronhavatoj trinkas la eternan antaŭlastan bieron aŭ kalikon da vino. Ĉiunokte mi auŝkultis, ĉe la fenestro de mia ĉambro, la muzikon de la nokto: du aŭ tri viriĉoj krietaj unu la aliajn, insultante, aver- tante "Malfermu buŝon kaj mi mortigos vin, granda fekaĵo kun kruroj!". Ili premas siajn pug- nojn. Sango eliras el la stomako kaj el la parto de la cerbo, kiu regas la pensa- don. Sango plenigas la arteriojn, kiuj cirkaŭas la plej gravajn muskolojn, por ke la viriĉo stultiĝu kaj luktu kontraŭ la malamika armeo de mil soldatoj aŭ la giganta besto 200-kilogramo peza. Problemo estas, ke tiu, kiu estas antaŭ li, ne estas besto nek armeo sed alia ebria sinkonfu- ziganto, kiu malhelpas la saĝan solvon kriante "Alproksimiĝu kaj via forĵetinda patrino ploros vian morton!" Preskaŭ neaŭdeble, virinaj voĉoj trafas miajn orelojn. Tiuj homoj ne prenitaj de la testosterono klopodas iom lumigi la bedaŭrindan sperton per vortoj similaj al "Ni iru, Amo. Amo mia, trankviligŭ. Amo, li ne meritas, ke vi malpuriĝu. Amo, venu kun mi". Kelkfoje virinoj sukcesas. Kelkfoje ne, kaj sekve estas batoj, krioj, virinoj surplanke, viraĉoj kun okuloj klopodante eliri el sia vizaĝo, policanoj venantaj...

Tiu sperto dum sufiĉe da monatoj montris al mi, ke bonega invento povas iĝi bedaŭrinda. Estus bone eduki infanojn por ke estontaj viroj plenaj da testosterono ler- nu, kiel kontroli ĝin anstataŭ esti kontrolataj de ĝi.

Oni sciu, ke tiuj bestoj kun longaj dentoj jam ne promenas surstrate, kaj ke la armeoj, kutime sed bedaŭrinde ne ĉiam, restas en siaj lokoj, sportante sen minaci iun. Ni, la socio, preskaŭ jam lernis. Restas kontroli tian spuron de la praestintenco.

Viko

KLIMATSANĜIĜO KAJ SEKVOJ

Ni jam estas konsciaj pri la sekvoj de la klimatsanĝiĝo, ĉefe konstateblaj en multaj mondopartoj, tiel en la tero kiel en la maroj. La internaciaj organizoj fiksis la nomatan “reto de la digno” nome: liberigi la homaron de la malriĉeco, de la malsato kaj de la malegaleco, ekde la vidpunkto de la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo” de Unuiĝintaj Nacioj (UN), lanĉitaj en la jaro 2015 kun aprobo de ĉiuj siaj membroŝtatoj ene de la evoluiga strategio de UN dum la periodo 2015-2030.

Nun la media malegaleco damaĝas al milionoj da homoj ĉefe de la sudo, rilate siajn plej bazajn rajtojn, kiel nutradon, aliron al trinkebla akvo, sanan ĉirkaŭaĵon ktp. Kiel la lastatempaj incendioj kiuj detruis sudan Ĉilion.

La nuna klimatsanĝiĝo post la malkresko de la forcej-efiko dum la pandemio, ni kons-tatas ke tiuj gasoj denove estas en niveloj kiuj superas la antaŭajn. Tiu pliigo kaŭzas pli altajn temperaturojn, rapida degeligado de la Arkto, altigo de la marnivelo en ĉiu ocea-no, kaj la okazigo de adversaj metereologiaj fenomenoj, nome, sekecoj aŭ gravaj inun-doj.

Ŝajnas ke tiu globalvarmiĝo estas sekvo de troa uzado de naturaj resursoj, ĉefe de la fosilaj karburajoj. Laŭ speciala informo de UN pri la ekstrema malriĉeco kaj homaj raj-toj, la 10% de la tutmonda loĝantaro pli riĉa konsumas preskaŭ 40% de ĉia energio, dum la plej 10% malriĉa konsumas nur 2% de tiu energio, kaj tamen, la 10% pli riĉa estas kiu kaŭzas la duonon de la monda forcejefiko.

Sed konstata ankaŭ ke nun, jam en la sudo, ĉefe en Afriko, tiuj forcej-efikoj pliiĝas, pro la konstanta starigo de eksterlandaj industrioj (ĉinaj, rusaj, usonaj) kiuj translokigis siajn poluajn aktivaĵojn al tiuj landoj kiuj havas pli malseverajn jurajn tekstojn pri pro-tektado de la medio.

Ĉiu ŝtato devas batali kontraŭ tiu tutmonda problemo, estante pli konsciaj pri tiu grava krizo kiu ne nur damaĝas la naturon sed ankaŭ la loĝantaron kiu suferas ĝin, nome la *klimatريفuĝintojn*.

Lastatempe multaj homoj estas devigataj elmigri el iliaj regionoj al aliaj zonoj pro tiuj katastrofoj kiel tertremoj, cunamoj dezertiĝo, plialtigo de la marnivelo kun perdo de iliaj insuletoj ktp.

Grava atingo estas ke la Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN agnoskis unuafoje en okto-bro de 2021 ke havi sanon kaj daŭripovan medion estas *homrajto*. Per tiu Rezolucio 48/13 la Konsilio petas kunlabori por agnoski kaj plenumi tiun homrajton.

Do, ni esperas ke la ŝtatoj kaj ni mem estu konsciaj pri nia agado por redukti tiujn no-cajn sekvojn.

M. Rafaela Urueña

IOM DA MATEMATIKO (13)

LA ROMIA NOMBROSISTEMO.

Kio estas nombrosistemo? Oni povas diri ke ĝi estas aro de reguloj kaj interkonsentoj, kiuj permesas nomumi kaj reprezenti kiun ajn nombron pere de limigita aro de simboloj kaj vortoj. Ekz., nia nuna sistemo uzas nur dek simbolojn: 0, 1, 2, ..., 9. Kaj nur du reguloj: unue, la valoro de ĉiu simbolo dependas de ĝia pozicio: ekz., en 546, "5" valoras kvincent. En 465, "5" valoras kvin. Due, kiam ni kalkulas ĝis dek, oni ne uzas novan simbolon, sed oni diras ke ni kompletigas unu "dekon" kaj restas nenian "unuon", do ni skribas 1 kaj 0, t.e., 10.

Multaj el ni ankoraŭ memoras, de kiam ni ĉeestis bazan lernejon, ke kiam instruisto parolis pri "nia" nombrosistemo, li ofte uzis du vortojn, kiuj karakterizis ĝin: "pozicia" (unua regulo) kaj "dekuma" (dua regulo).

Sed nun ni fiksu nian atenton sur tiu vorto "nia", kiu iamaniere instigas pensi, ke ĝi estas la sola nombrosistemo, kiun ni uzas. Tamen, tute NE estas tiel. Ni uzas du aliajn nombrosistemojn: unu estas la romia kaj la alia estas tiu, kiun ni uzas por la tempomezuro (horoj, minutoj, sekundoj, semajnoj, jaroj, ...) kaj por la angulomezuroj (gradoj, minutoj, sekundoj, ...), sistemo nomata "sesdekuma".

Hodiaŭ ni okupiĝu pri la romia nombrosistemo. Sur la apuda foto oni vidas enskribon gravurita sur ŝtono en la Palaco de la Aljafería en Zaragozo, kiu reprezentas la jaron 1492, ege grava en la hispana historio.



En tiu sistemo oni uzas literojn, kiuj havas nombran valoron, tiel ke

$$1 = I, V = 5, X = 10, L = 50, C = 100, D = 500, M = 1000$$

Kutime, por reprezenti nombron, oni ordigas la literojn, de la plej altvaloraj al la malplej valoraj. Kaj por atingi la tutan valoron, oni sumas la valorojn de la diversaj leteroj: ekz., $XXV = X + X + V = 10 + 10 + 5 = 25$

Sed kiam maldekstre de litero troviĝas alia malplivalora, oni subtrahas tiun ĉi de la unua: ekz., $IV = V - I = 5 - 1 = 4$. $IX = X - I = 9$. $XIX = X + X - I = 19$.

$$XL = L - X = 40.$$

Pri la kialo de elekto de tiuj simboloj, oni ne tute certas. Estas diversaj hipotezoj. Ekz., la verkisto Isaac Asimov, en sia libro “Pri la numeroj kaj ĝia historio”, iom amuze, proponas ke “T” povus reprezenti unu fingron (fakte en multaj antikvaj nombro sistemoj, eĉ en la nuna mem, daŭre aperas similan simbolon por unu).

V povus reprezenti unu manon kun kvin fingroj.

X povus reprezenti du manojn kunigitaj en la pojnoj.


L kaj D oni ne scias.

C kaj M estas la komencliteroj de cent kaj mil.



Kiel dirite, tiu ĉi nombrosistemo estas ankoraŭ uzata kaj oni instruas ĝin en lernejoj, sed nur rolas kiel ornamaĵon de monumentoj, en la nomoj de reĝoj kaj papoj kaj, tre ofte, por reprezenti jarcentojn.

Tamen, ĝi estis ĉies uzata en Eŭropo ĝis la 16a jarcento, kiam iom post iom oni enkondukis la nunan, nomata “araba” aŭ “hindoaraba” pro ĝia deveno. Tiu enkonduko estis nek rapida nek facila, ĉar multaj homoj kaj institucioj kontraŭstaris la novajn “diablajn” ciferojn kiuj, laŭ ili, volis forviŝi la klasikan hereditan romian kulturon. Sed, finfine la nova nombrosistemo triumfis kaj nun estas uzata tra la tuta mondo, malgraŭ ke ĝi kunvivas en kelkaj landoj kun aliaj.



Aŭtomobilŝildoj en araba lando kaj en Japanio.



Por fini, jen alia kurioza anekdoto. Multaj horloĝoj, iom snobisme, uzas romiajn ciferojn kaj, en multaj el ili, la numero kvar estas reprezentata per “III” anstataŭ “IV”. Tamen, en ili, naŭ estas “IX”.

Denove Isaac Asimov donas la kialon de tia “strangaĵo”. Laŭ li, la subtrahan regulon (t.e., kvar = IV) estis uzata nur de tempo al tempo ĝis kiam ĝi oficialiĝis en mezepoko. Tiu prokrasto ŝuldiĝus, laŭ li, al la fakto ke IV (“kvar”) estas la komencliteroj de la vorto IVPITER, la plej elstara dio por la romianoj, kiuj eble iom timemis uzi eĉ la komencon de tiu vorto.

Jesús M. García Iturrioz
jmgiaa@hotmail.com



Aliĝilo

82-a Hispana Esperanto-Kongreso

05-08 de sept, 2024

Cheste (Valencia) Hispanio

<http://kongreso.esperanto.es>

esperanto.kongreso.2024@gmail.com

Familia Nomo

Persona Nomo

Adreso:

Telefono:

Via ret-adreso:

HEF-ano, LKK-ano: Jes, Ne

Viro, virino:

Indiku viajn
servojn
sube!

Kotizo-Kategorioj

	marto	aprilo	majo	junio	julio	aŭg	sept	SUMO
Membro de HEF	39 €	39 €	44 €	44 €	49 €	49 €	54 €	
Ne membro	59 €	59 €	64 €	64 €	69 €	69 €	74 €	
Junulo < 30 jaroj	15 €	15 €	17 €	17 €	19 €	19 €	23 €	
Eksterlandanoj	15 €	15 €	17 €	17 €	19 €	19 €	23 €	
Akompanantoj – ne E-istoj	10 €	10 €	10 €	10 €	10 €	10 €	10 €	

Tranoktado (2-lita ĉambro)

sep 5, ĵaude (alveno-tago)	30 €	30 €	30 €	30 €	30 €	30 €	30 €	
sep 6, vendrede	30 €	30 €	30 €	30 €	30 €	30 €	30 €	
sep 7, sabate	30 €	30 €	30 €	30 €	30 €	30 €	30 €	
sep 8, dimanĉe (foriro-tago)	0 €	0 €	0 €	0 €	0 €	0 €	0 €	

Ekskursoj: 28 alternativoj, ene kaj ekstere de Valencio

1a semana (7 ekskursoj)	35 €	35 €	40 €	40 €	45 €	45 €	50 €	
2a semajno (7 aldonaj ekskursoj)	30 €	30 €	35 €	35 €	40 €	40 €	45 €	

Manĝoj*: Surloke: matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo

* Se vi loĝas surloke, vi kunmanĝos en la studenta restoracio ĉiutage (detaloj en reto)

Pago:

Per ĝiro: IBAN: ES40 3159 0073 2729 9201 3827,

SUMO

Kodo SWIFT: BCOEESMM159 / Banko-nomo: Caixa Popular

Detala Informo: kongreso.esperanto.es, ← Informu vin ĉi tie

Retpoŝto: esperanto.kongreso.2024@gmail.com ← Sendu vian aliĝilon ĉi tien!